



PENSEO

N-ro 376

feb. / 2023

Monata Beletra Revueto en Esperanto
Honorita de Premio Grabowski, 1994

Fondita en 1990; Enretigita en 1997 la 34-a jaro <http://www.elfino.cn/penseo/penlisto.htm>

Anteo (Ĉinio)



Ruĝdoma sonĝo

omaĝe al Xie Yuming (1941-2022)

ratoj kaj termitoj okupas
la domaron de la avino, kie fenikso naskiĝis
en la nesto de kokoj.
trabatinte al si vojon en veprejo,
la avo faris kampojn
kaj tiujn irigacis per sia sango kaj ŝvito
sed nun ili fariĝis arbedujo.
rizo manĝebla, rozo ornama.
en la okuloj de la idoj cervo estas ĉevalo.
sur la antikvaj spuroj kuŝas vipuroj.
fiŝoj flugas el la urbo
kaj akvo surrampas la monton.
lagoj plenas de cemento kun ŝtalo
kaj fonton sekigas pumpiloj soifaj.
telefono scias telepation;
sian filinon ne konas patrino.
tro da lakto de virbovo, tro da blanko el nigro.
fulmoj kaj tondroj venas el larmigaj bomboj.
fabrikofumo koloras la ĉielon.
korvoj kaj pigoj migras en fendojn de
nubskrapantoj.
la lupoj pereis.
vulpoj prezentas sin kiel dogojn.
pio, opio.
fungoj kaj bambuoj konkuras kun palacoj
subteraj.
la spiritoj de la restintoj
ĝuas cent jarojn da soleco,
atendante tombopriŝtelistojn.
abelas arkeologoj orientaj kaj okcidentaj.

verkistoj kaj tradukistoj nunaj kaj
antaŭmiljaraj gapas surmape.
poemoj en la romano kaj la romano en
poemoj.
rimoj kun ritmoj kaj ritmoj sen rimoj.
vi mi ŝli ŝanĝiĝas kalejdoskope.
akve kaj temperature alternas homo besto
pejzaĝo.
zeno de budhismo fandas la terglobon kaj
universon,
inter ili vi sidas lotusflore.
ni, posteuloj, mute ploras dolore.
ŝafoj manĝas tigrojn.
fore fore vi kabeis por malkabei stelojn
karmemore.

Tiberio Madonna (Italio)



La renkonto kun la trompo

Kiam la suno kraŝis faleginte
sur la teron
mia mond' ekfajris
kaj la koloroj de la vivo
englutitaj de la flamoj
estas ĉiuj ŝanĝiĝintaj
en ununuran
grizon fuman.
Nun mi vagas tra la stratoj brulintaj
kun la ŝlosiloj de la morto
enpoŝe
preta ilin eltiri
per la frostaj manoj
por malfermi la kradpordon rustan
de mia finiĝo.
Nun kiam mia suno ne estas plu
restas al mi la steloj

etaj
 kiuj brilas
 sed nenion lumigas
 en la nokto murda.
 Mi renkontas unu
 iom pli helan
 sed laca sin teni supre
 ĝi mizere sin mallevas
 sur la straton glacian
 kaj kvazaŭ de braĝero
 kun mortanta lumo
 ĝia ardo trompa lasas lokon
 al fumfadeno.
 Al kio utilas la memoraĵo
 pri amikeco forfumiĝinta
 pri amiko kiu trompis
 per sia lum' efemera
 mian jam afliktitan
 animon?
 Nur esti surtretita
 per la ŝuoj lacaj
 kaj seniluziiĝintaj.
 Kaj ankoraŭ restas al mi
 la ŝlosiloj de la morto
 enpoŝe.

**3a premio ricevita en la Belartaj Konkursoj de UEA
 en 2020*

Maria Nazaré Laroca (Brazilo)



Pluen

Esperanto, amletero
 liverita al la homaro
 de l' amema kuriero
 el la kor' de ĉies Frato!
 Sed min trafis la donaco
 nur en la jar' du mil tri,
 kiam voĉo en la kapo
 aŭdiĝis tute surprize.
 Pli ol propono jen ordono
 por nepra studo de l' lingvo
 internacia, por ĉiam!

Malfermiĝis horizonto
 per la magia ŝlosilo!
 Mi traveturis la mondon
 kaj kun multoj amikiĝis.
 En pluraj mondaj kongresoj
 partoprenis mi plezure,
 kaj verdan kulturon festis
 kun granda ĝojo kaj ĝuo!

Emociajn travivaĵojn
 mi spertis en Bjalistoko
 kaj en Bulonjo-ĉe-Marco,
 ja neforgesebla gloro!

Tamen venis sortobatoj,
 kaj mia vivo ŝanĝiĝis;
 pro la dolor' senkompata
 al mi ne eblas foriri.

Ho, ve! Kia elreviĝo!
 Ne plu kongresaj ĉeestoj,
 sed l' aferon mi daŭrigas
 entuziasme, amplene,
 per poezia verdiĝo.

Juiz de Fora, 09/01/2023.

Elektioj

En la vojirado de l' vivo
 mi ĉiam elektis la vojojn,
 kiel naiva papilio senatenta.

Nun la malfacila vojo nefarita,
 sen averto, min elektis,
 kaj aŭdace min trairas.

Juiz de Fora, 22/01/2023.

Ángel Arquillos (Hispanio)



Kiam mi lasas la mondon

Kiam mi forlasos la mondon,
 enmemiĝinta en somnolon
 mi jam estos forgesita.

Dum moment'
 pro mi vi ploros
 simulante veran amon
 en funebra nigra vesto.
 Vi daŭrigos vian vivon
 komencita de antaŭlonge
 netaksante la gravecon
 de perforto kaj ofendo
 kaj la senlima sufero
 kaŝita pro mia honto.
 Kiam mi lasos la mondon,
 atingos mi la ripozon
 ĉar mi tuŝos la ĉielon.

Antanas Vaitkevičius (Litovio)



Paŝoj

He! Paŝoj malantaŭe!
 Kaj ŝajnas tuj Vi vokos min.
 Ekturnas mi,
 Sed estas nur nebulo,
 Vizaĝo fremda
 Kaj en pasinton forfluganta la sekundo...

Spegulo

Komforte estas ne posedi la vizaĝon
 Kaj havi karakteron sen difin' —
 Similus mi jen al persono aĝa
 Kaj tuj aspektus ĉarma belulin'.

Respeguligi povus mi la tutan mondon —
 Ĉielon vastan, ondojn de la mar',
 Eĉ nekonkereblajn altajn montojn
 Posedi povus mi en mia propraĵar'.

Ekzistas tamen unu obstakleto ĝena,
 Kiu detruas miajn revojn pri liber':
 La mastro mia tre malofte tenas
 Min en la manoj,
 por ke mi
 respegaligu
 ravojn de la ter'.

Moissej Bronshteyn (Rusio)



Konsiderante dian benon,
 mi kredas ke l' venanta jar',
 jam per la salutinda ven' en
 la mondon, ŝanĝos ion ĉar

malico vivas ne eterne,
 ĉar fortas pli mizerikordo,
 ĉar kredo al la sankta ver' ne
 vanuas el la nobla koro.

Do tiuj, kiuj malnoblulas,
 ricevos punon laŭ merito,
 kaj paca man' de panjo lulos
 infanon en kvieta lito,

kaj spurojn de l' kruela vintro
 forlavos freŝa maja pluv',
 kaj hela am' kun pura virto
 ekregos nian mondon plu,

kaj amikeco malgraŭ plagoj
 kunigos nin por nobla faro.
 Ni tostu je feliĉaj tagoj
 De l' 2023-a jaro!

Hodiaŭ ensonĝe mi vidis militon —
 ĝi estis horora.
 Mi vidis plotonon, atake pelitan
 kun bleko stertora,
 kaj hom' kontraŭ hom' bajoneton direktis
 en ardo kruela,
 kaj ambaŭ, kun pen' antaŭ mort'
 interplektis
 la brakojn — ĝi estis signal',
 impeta aŭdaco
 al vivo eterna en paco,
 en bene amika eden' - post la fal'.

Hodiaŭ ensonĝe mi vidis militon —

ĝi estis terura.
 Mi vidis, ke fale forlasas la liton
 soldato senkrura.
 Laŭ latoj de l' planko impetis li rampe
 al sava fenestro.
 Mi volis haltigi kriante, plorante,
 sed estis sensona la vok'.
 L' ovrita fenestro
 kaj lia subita foresto
 min vekis, plorantan en fundo de l' nokt'.

Hodiaŭ ensonĝe mi vidis militon —
 min frapis la sono,
 ke estas mi mem ekde nun ekzilito
 en tiu ĉi sonĝo.
 Gutoj frapadas al la
 haŭto de l' vangoj pala.
 Kiom da ili? — Mil da.
 Ĉies tuŝeto — milda.
 Kun la tuŝetoj vantaj
 larmoj apenaŭ salas,
 kaj de-sur viaj vangoj
 ili jam akve falas.

Pluvo inter ni, pluvo —
 falas frapetar' — jen do.
 Fluas inter ni, fluas
 akvo – ofendo.
 Horo horon postkuras,
 guto guton — atinge.
 Plaŭde flakoj forspuras
 eĉ ne mansvinge.

Varmis lucerna lumo.
 Ni ne atentis tion –
 ĵetis en urbon pluvo
 hastan melankolion.
 Ni eĉ ne emas peni
 simple forgesi l' mison.
 Kiu, do, kulpas, ke nin
 pluvo direktis disen?



PAPOS NASCENTES (Brazilo)



Espero

Post la tempest', trankvilec'.
 Post la malhela nokto de la anim',
 la ora aŭroro lumu nin,
 espero iĝu fratec', solidara fratec'.

Printempu tuj, ho mia kor',
 en mia brusto tuj, dia favor'!

Mi tanĉita

miksaĵo de malkvieto kaj juko
 mia haŭto flamas, seka pajlo
 forestanta dormo scias sin forlaso
 sur-haŭta ploro kiu sur-okule mankas
 estas mi ĉiuj bruloj sur la Gea krusto
 ĉar mi ne dormas, poezie mi min
 konsumas
 la arda poezio de doloro min konsumas
 kaj forte mi jukas kaj krude mi jukas
 ekstere mian tagon minacas Suno
 kiam mia haŭto ne brulos plu
 io ĉe mi esperas, ke mi ŝanĝiĝu
 sed la ŝanĝo mem nur jukas
 prokrastas foriras
 por pan-aĉeto mia vivo foriras:
 restas al mi paneroj
 kie antaŭe estis pan-tranĉo!

Klaus Friese (Germanio)



Survoje per fervojo

Survoje per fervojo
 al ĉefa stacidom'
 vojaĝas mi kun ĝojo
 kiel feliĉa hom'.
 Nur ĝenas min la masko
 pro l' aĉa pandemi'.
 Ĝi zorgas pri la tasko,
 pri sana strategi'.

Regas strikta regulo.
 Ĉu taŭga aŭ ĉu ne?
 Se dubus iu ulo,
 venas la pun', ho ve!
 Necesas la distanco
 al via proksimul'.
 Nur estas magra ŝanco
 rekoni per okul'.
 Rigardo al virino,
 kaŝita, sen kaŝpens'.
 Nun mankas la fascino.
 Pro masko mankas senc'.
 Eĉ belus la vizaĝo,
 amika kun nature'.
 Kovrita per bandaĝo
 perdiĝas la plezur'.
 Maloftas la momento
 por bela maneken'.
 Aperas la prezento,
 leviĝas la kurten'.
 Ŝi manĝas pro malsato
 kaj liberigas ŝin.
 Jen venas rezultato.
 Ŝi eĉ rigardas min!
 Do, manĝi sen la masko
 ebligas nun sen hasto.

Politikisto

Petro estas saĝa knabo,
 kun la plan' por la futur'.
 Certe en altranga stabo.
 Realigo pro l' natur'.
 Panjo, ĉu vi scias jam?
 Petro estas optimist'.
 Kaj nun venas la proklam'.
 Estos mi politikist'!
 Ne kontenta la patrino.
 Kia stulta la ide'!
 Kial tiu halucino?
 Simple diras mi nur: Ne!
 Mi jam pensis pri l' motiv',
 diras Petro kun certec'.
 Profesi' kun bona viv',
 estas part' de fama spec'.

Estos mi en televido.
 Ĉiuj homoj konos min.
 Estos mi asteroido,
 ne nur laca zepelin'.
 Mi vojaĝos tra la mond',
 loĝos en kosta hotel',
 kiel riĉa vagabond'.
 Eĉ pli bona ol anĝel'.
 Sed pripensu, mia filo.
 Ne facilas reelekt'.
 Tial restas la konsilo:
 Sen elekto, sen protekt'.
 Panjo, jen neni ŝerc':
 Mi ja estos lobiist',
 arda por armilkomerc'.
 Estos mi politikist'!

Rita Mkrtĉjan (Armenio)



Kion pensas vi en neĝa tago?
 Ĉu pri belaspekto de neĝeroj?
 Eble pri la frost' senfina vintra,
 Aŭ pri la vivo iam senespera.

Ĉarmas bela bildo en fenestro,
 Kie dancas blankaj "papilioj",
 Neĝo kovras lacan teron, kaj rondiras
 Sen la cel', kiel neĝeroj, revoj niaj.

Blazio Vaha (Hungario)



SIMPLE

Ĉio estis simpla.
 Vi estis kontenta,
 vi estis kontentaj.

Ununombre, multenombre.

Ĉio estis simpla,
 Vi kontentis,
 Vi kontentis.

Je nombro neŭtrala.

Ĉio estas simpla.
Sendistinge.

Ĉio restos simpla.
Kion oni volos diveni,
tion oni divenos.

Paroli ne estas nepre.

Saulo Salgado Wanderley (Brazilo)

Jen Esperanto

Jen tie ĉi la Verd-Esprimo de Paco!
Ĝi decide flugante de loko al loko
kreas por la homo da Feliĉo amason
enharmonie, serioze, sen moko!

Tie ĉi la Blank'esprimo de l' Espero!
Bruege faladas la obstinaj baroj,
apartiĝas homaro kaj la sufero,
al ili, ĝis Feliĉon, montrante vojojn!

Tie ĉi la Blu-Esprimo de l' Kompreno!
Ame, frate kunigante la homaron
kristane nin trenas, en benita treno,
belege, amikece, al l' anĝelaron!

Estas decembre nune, amikoj bonaj!
Ni profunde kaj karece rememoru
Pac-Apostolon, el la plej fruktodonaj,
Zamenhofon, belsimbolo de l' moro!

Sed ni ĉiuj, plej profunde dankegu La **DION**,
viŝante el la humana koro la triston,
ankaŭ per Li, La Granda Pacbatalanto,
ankaŭ per Li, La Granda Pacorevanto:
Zamenhof!



Candeia

Yohanes Manhitu (Indonezio)



Sed mi revenas

Mi transiris la tempon
sen ia poezio
kiu konsolis min
kun tenero.

Sed mi revenas.
Jes, mi revenas.
Estas dank' al ŝi
kaj ankaŭ por ŝi –
mia konsolantino.

Kia silento!
Kia soleco!
Se mi foriras de ŝi
kaj miaj noktoj estas tiel longaj.

Sed mi revenas.
Jes, mi revenas.
Estas dank' al ŝi
kaj ankaŭ por ŝi -
mia konsolantino.

Bela poetino

Bela poetino, estaĵo de litero.
Via dolĉa vivo estas plena de graco.
El via sankta animo, vi skribas.
Viaj vortoj lumigas la vivon.
Bela poetino, mi amas viajn poemojn.
Nun mi ne povas vivi sen vortoj.
El via animo, mi trinkas akvon de paco.
Viaj vortoj pentras mian vivon.

Jadranka Miric (Serbio)



Novjara feliĉo

Malantaŭ ornamita pino
brilis okulparo via.
Vi trovis trankvilon je mia sino,
aŭskultante tiktakado de koro mia.

Tra fenestro aperis sunlumo.
Baldaŭ mateniĝos,
kaj mi ankoraŭ en via brakumo.
Ekstere homoj brue amuziĝas.

Morna mateno

Plombaj nuboj kaŝis stelaron,
Densa pluvo. Perdiĝis vojetoj.
Forflugis birdoj desur branĉaron.
Pro akra malvarmo frostiĝos marĉetoj.
Aero odoras je neĝo.
Blankiĝas ĉielo .
En varma ĉambro aŭdiĝas preĝo,
por animo la savanta spiritmielo!

Maillonga neĝervivo

Faladas blankaj neĝeroj.
Ĉio blankiĝas. Densiĝas aer' .
Kia belaspekta natura afer' .
Neĝeroj teksitaj el kotoneca aĵeroj.

Tagmeze eliris suno,
Tutforte ĝi radiis,
sendante varmon tra aer' .
De neĝo restis nur makuloj sur ter' !

Yi Qiao (ĉino en Germanio)



ELIZEO

Mi aŭskultas sonojn de ĉielo,
rigardante mondan la aŭroron.
Mi vagadas sub la matenstelo,
sopirante dian la favoron.

Kio mankas al mi jam ĉagrena?
Kian bildon mi ĉi-nokte revas?
Vivo sen vi ŝajnas ja mornplena,
Rendevuon songe mi ricevas.

Tie lumas sankta pacofonto,

garde de vi oni bone fartas.
Super la nubtuŝa kruta monto,
via brilo nin tenere vartas.

Bonkonata nun la verideo:
firmamento ja 'stas Elizeo.

Soneto pri anima amikeco

Rara amikeco lumas pure,
baze de animo en gefratoj.
Ni aprezas versojn plenplezure,
imagante ĉion laŭ bonŝato.

Rojoj lirlas kun ni tra la valo,
sinuante, ĝoje kaj fervore.
Bambuvepro viglas en ĝangalo,
plaĉe al ni, verde kaj favore.

Sento ardas kun pasio bona,
konsolante dolĉe nin tenere.
Afineco restas ja serena,
ni telepatias korsincere.

Tage nin salutas hela l' suno,
nokte kun ni flustras klara l' luno.

Samideana amikeco

Nia amikeco daŭras pure,
kunlaboras ni sur vojo glata.
Esperanton laŭdas ni plezure,
parolante jam laŭ tem' amata.

Rojoj fluas vigle tra la valo
kun espero, verde kaj fervore.
Ĉinaj pandoj venas el ĝangalo
kiel pacsenditoj tre favore.

Sento novas kun ideo bona,
inspirante ĉiujn tuj tenere.
Afineco restas ja serena,
ni samideanas korsincere.

Tage nin salutas hela l' suno,

nokte brilas kun verdstelo l' luno.
Ivanichka Magharova (Bulgario)



Ĝemas la ŝalmo
 ĉe la frua tagiĝo.
 Velkas folioj

Mildaj manplatoj
 petas. Nokto solecas.
 Mankas lampiroj.

Ho...! Papilio
 tuŝetis mian brakojn.
 Tener' eriĝema.

La palaj fingroj
 jen sorĉadas la klavojn.
 Ŝekspira sonet'.

Manplatoj tremas.
 La ŝtono ekparolis.
 Ĝemo en silent'.

Elena Popova (Bulgario)



KRISTNASKA BENO

La steloj brilas, kantas
 pri la Kristnasko sankta.
 Al la homoj ili montras
 helan vojon kaj aŭguras.
 La cervoj kun la sledo kuras
 de stelradioj lumigitaj.
 Portas en ĝi oldul' fama
 donacojn atenditajn.
 Dio sekrete, kiel ĉiam,
 benas nin per sia amo.

KANTO DE UNU FLORO

Mi estas malgranda floro,
 sed mi kantas tutkore
 la kanton de l' Universo.
 Ĝi estas Amo. Mi
 portos ĝin al ĉiu koro.
 Kredu min, kant' ĝi estas

kun vortoj malfacilaj,
 sed ĉu estas Am' facila?

Ardo (Ĉinio)



Neĝeroj dancas, vento blovas,
 en frosto tremas sekaj floroj.
 Kovimon spiti mi ja povas,
 bonfartu pli en ontaj horoj!

(13.Jan.2023)

Hans-Georg Kaiser (Germanio)



Horloĝkukolo

El la horloĝo
 saltas kukolo
 post ĉiu horo
 sen hezit'.

Ne gvidas ĝin
 libera volo.
 Ĝi estas ligna
 kaj sen spit'.

Mimoza Ahmeti



Vespera melankolio

Ĉu forgesiĝos miaj kuprecaj haroj,
 La osteca ora linio, meze de mia brusto,
 Ambaŭ elektraĵoj okuloj, ambaŭ fajroeltenaj
 lipoj,
 Kaj la muskolecaj kruroj, malpeze irantaj...

Ĉu forgesiĝos miaj manplatoj kvazaŭ la
 fortuno?
 Vespera melankolio estas la posttagmeza
 pluvo,
 La okullikvaĵo tremigas enigmaan lumon.
 Troa estus la parolo se mia junaĝo
 Kaj la vivo kun ĉiuj kisoj

Denove ripetiĝus...

Suspende

Estis sendolora vakuo
Kie povus resti, kie povus dormi.

Estis seneventa vivo
Ne okazis kuniĝoj ĉar ne okazis disiĝoj.

Estis sensentimenta profundeco
Plenigita per ombroj kaj senmovaj akvoj.

Estis senkoncentra rigardo
Tenis lumon sen navigado.

Estis perfekta nulo,
Feliĉa ne sentiĝis, nek ofendita.

Partopreno

Kontempli min,
Animskui min...

Imagebla la ĉeesto de animskuo
Pro kelkiu, eĉ pro iu atendo...

Sed ne okazas. Ne plu okazas
Ekde kiam ĉio far mi estiĝis.

Ekde ĉio far la aliuloj estiĝis
Kvankam suferis, la spirito ebriiĝis
Dum atendo, soleco kaj ekzalteco.

Estis figuro, tento, prilumigo..

Sed ne plu okazas. Ne plu okazas
Ekde kiam far mi ĉio estiĝis.

Elalbanigis



Bardhyl Selimi (Albanio)

El Ĉina Antikva Poezio

Xin Qiji (1140-1207)

MALFRUA PRINTEMPO

—laŭ melodio *Kanto pri Zhu Yingtai*

Mi donis al li la harpinglon
ja kiel memoraĵon por sopiro,
fordsendis lin al riverbordo
kun salikarboj en spaliro.
Ascendi mi tre timas l' altan turon
por ne min ĝeni per korŝiro,
pro trista ventpluvado preskaŭ ĉiutaga.
Petaloj morne falas de ventpelo en
ekzilo,
neniu tamen zorgas pri ilia sorto,
nek ŝŝ-haltigas por anim-trankvilo
ĉirpadon oriolan bruan
kiu ja ĉagrenigas homojn ĝis larm-tiro.

Rigardas mi petalojn enŝovitajn
en tempiharojn en spegulo,
kaj mi aŭguras lian daton de reveno
per ili, kaj renombras ilin en kalkulo
ja por eviti misnombradon.
Malhela lampo la vualon kontraŭ kulo
prilumas, kaj mi dronas en la sonĝo,
en kiu mi plorsingultas kun murmuro:
“Printemp’ alportis jen al mi ĉagrenon,
sed la printemp’ forlasis jam en kuro
sen porti la ĉagrenon de mi foren,
kaj ĝi rezidas en mi kun torturo.

—laŭ melodio *Aŭguristo*

Kun ĉagren’ mi staras sur la belvedero,
sube fluas Yugu-rivero,
kiu jam forportis multe da trist-larmo
de fuĝintoj pro milit’ en svarmo.
Al nordokcidento, kie la ĉefurbo sidas,
mi rigardas, sed nenion vidas,
krom tavolo sur tavolo

da verd-montoj en la foro.

Montoj tamen ne kapablas ja sukcese
bari la riveron, kiu fluas jen senĉese
al direkto l' orienta
ĉiam laŭ la kurs' serpenta.
Ĉe l' subiro de la sun' vespera
mi jen dronas en ĉagren' sufera.
El l' arbar' alŝvebas krio
de perdrikoj—jen aflikta la ario.

—*laŭ melodio Serena muziko*

Malsataj musoj kuras ĉirkaŭ l' lito,
vespertoj super lampo flirte dance.
Ventpluv' el pinarbaro je subito
frapadas la tegmenton disonance.
Fenestrapapero disŝirita en ekscito
kvazaŭ parolas al si ekstravagance.

Dum tuta viv' mi vagis sude,
mi revenante jam senile
blankharas, palvizaĝas faltotrude.
Dumnokte mi vekiga tre facile
pro minca litokovrilo, songolude,
riverojn, montojn vidas vesuspire.

—*laŭ melodio Akva drako*

Mi turnas kapon al nordokcidento
kie nuberoj flosas surĉiele.
Necesas longa glavo por subteni
ĉielon vastan ja je dekmil lioj.
Laŭdire oni ofte vidas en ĉi tiu loko,
ke bril' de glav' pafiĝas al la steloj.
Mi opinias, ke la montoj tie ĉi tre altas,
la lag' profundas kaj la akvo fridas,
la luno brilas kaj sporadas steloj en pallumo.
Mi volus ekbruligi rinocerokornojn
por suben pririgardi, sed mi timas,
—ĉe l' balustrad' min trafas penso—
ke vent' kaj tondro furiozus
kaj fiŝoj, drakoj koleregus.

Rivero verda fluas stringe inter montoj,
tra l' alta etaĝadomo, ŝajne ekflugante

sed kun sinretenemo evidente.
Jam mi oldiĝas kun perdita forto,
prefere mi kuŝiĝu sur trankvila lito,
senzorge vivu simplan vivon.
Leviĝ' kaj ruiniĝ' de dinastioj dum mil jaroj,
paseoj de mizer' kaj ĝojo
jen filmas antaŭ mia okulpar' senĉese.
Do lasu! ĉio jam forpasis.
Nu, tie, kiu ferlas velon, albordiĝas
al sablobenko, kaj alligas ŝnuron
sub la vespera subiranta suno?

—*laŭ melodio Kavalira danco*

En lamplum' mi pririgardas glavon,
sub instig' de vinebrio.
Ŝajne mi revenas al milittendaro:
sonas kornoj tra aer' per ambicio,
pretas jam rajdistoj por disdoni la ordonon
al diversaj trupoj per misio.
Grandioza militkanto ŝvebas
trans dezerto, resonante kun pasio.
Jen okazas la kampanjo
en aŭtunsezono, sur batallinio.

Nun galopas la militĉevaloj
kiel feaj bestoj fulmrapide;
kordoj de pafarkoj vibras
kvazaŭ tondrus ĉionspite.
Por la fam' de suvereno
ni reprenu brave kaj decide
la teritorion kaperitan
de la invadantoj jen inside.
Ho, malfeliĉe mi jam hargriziĝas
kaj ne min dediĉas ja milite.

Elĉinigis



Vejdo (Ĉinio)



Dai Fugu (1167 – 1248)

Sur boato en luna nokto

La boato saturita de lunlumo
Dronas kvazaŭ en etero.
La helverda akvo glate senondeta
Spiras froston en aero.

Mia poezia patosemo flosas
Ombre de la mastoj hante,
Kaj la lirikismo drivas en la plaŭdo
De remiloj songolande.

Tiuj surĉielaj steloj sin spegulas
Sur freŝverda lago sole;
Krias sovaĝaj anseroj en akv-herboj
Kontraŭ la vento gakplote.

Kelkaj ŝiplanternoj flagras ĉe l' pramejo,
Kiu de pratemp' ekzistas;
Gutas rosoj de platanoj ĉe l' rompita
Ponto, kiu ja persistas.

Zhao Shixiu (1170 – 1219)

Rendevuo neplenumita

En periodo de flavaj umeoj
Pluvetas ĉie super la kabanjoj,
Kaj ĉiuloke, ĉu sur la herbejoj,
Ĉu sur la bordoj lagaj, kvakas ranoj.
L' antaŭa duonokto sin fortrenis,
Amiko mia tamen ne alvenis;
Mi ŝaktabulon fingre frapas
Kaj al restaĵo de la meĉo gapas.

Cao Bin (1170 – 1249)

Malfriua printempo

Neniu prizorgas la florojn falantajn ekstere,
La ombroj helverdaj etendas sin ĉie surtere.
Trili oriojoj en arboj jam ĉesis; mi sola
Ĉe l' lago herboza aŭskultas ran-kvakon

prefere.

Gao Zhu (1170 -1241)

En la Festo de Mortintoj

Sur la montoj suda kaj eĉ norda multas
tomboj,
Kiujn oni kultas en ceremoni' ofera.
Papercindro flugas kiel blankaj papilioj;
Oni larmas, dum kukolo kukuas mizera.
Post noktiĝo vulpoj dormas sur la
teramasoj;
Reveninte, l' idoj ŝercas en lumo kandela.
Drinku tiom, kiom vi kapablas, ĝis ebrie, -
Ĉu eĉ unu guto fluis al la mond' subtera?

Elĉinigis



Minosun (Ĉinio)



Zhuangzi

ĈAPITRO TRIDEK UNUA

La maljuna fiŝisto

§31-02

Farinte longan suspiron de emocio Konfuceo ankoraŭfoje riverencis. Poste li rektiĝis kaj diris:

“Mi estis dufoje elpelita el la regno Lu; mi estis malpermesita meti la piedojn sur la teron de la regno Wei; la arbo en la regno Song, sub kiu mi donis miajn prelegojn, estis hakfaligita; mi estis sieĝita en la loko inter la regno Chen kaj la regno Cai. Mi ne scias, kiajn erarojn mi faris, por suferi tiujn ĉi kalumniojn.”

La maljuna fiŝisto ekaspektis iom simpatie, dirante:

“Vi havas la kapon tro malmolan por kompreni la veron. Iuj homoj timas sian ombbron kaj abomenas siajn piedsignojn, tiel ke ili, por eviti ambaŭ, rapide kuras antaŭen. El tio sekvas, ke ju pli rapide ili kuras, des pli multajn piedsignojn ili lasas post si kaj des pli ili ne

povas forlasi sian ombron. Kiam tio okazas, ili pensas, ke ili kuras ne sufiĉe rapide, kaj tial ili kuras pli kaj pli rapide, ĝis ili elĉerpiĝas kaj mortas. Ili estas tro malsaĝaj por scii, ke iliaj ombroj malaperos, se ili nur restos en ombrejo, kaj ke ili ne plu lasos piedsignojn post si, se ili nur haltigos sian kuradon.

“Vi similas al tiuj homoj per viaj esploroj pri la humaneco kaj la justeco, per viaj distingo inter la identeco kaj la diferenco de estaĵoj, per viaj esploroj pri la ŝanĝiĝoj de ĉiaj movoj, per viaj reguloj por akcepto kaj rifuzo, per via akordigo de la sentoj de amo kaj malamo kaj per via reguligo de la stato de la humoroj. Sed ĉio ĉi tio apenaŭ evitigas al vi fali en la ok malvirtojn kaj la kvar malbonojn. Tial vi devus doni pli da atento al la kulturado de viaj propraj korpo kaj spirito, peni konservi vian propran naturan dispozicion kaj forgesi la respondecojn, kiujn vi altrudis al vi mem. Nur tiam vi estos libera de ĉiaj devo-ligiloj kaj ŝarĝoj. Nun, anstataŭ kulturi viajn proprajn korpon kaj spiriton, vi provas remuldi alies korpojn kaj spiritojn. Ĉu vi ne pensas, ke tiel agante vi ja jungas la bovon malantaŭ la plugilon?”

Konfuceo aspektis malgaje kaj demandis:

“Bonvole diru al mi, kio estas la natura dispozicio?”

“La natura dispozicio,” respondis la fiŝisto, “estas la perfekta sincereco. Kiu ajn ne estas perfekte sincera, neniel povas tuŝi la emociojn de aliaj. Tial la altrudita ploro nur ekstere ŝajnas trista; la altrudita kolero nur ekstere ŝajnas severa; la altrudita korvarmeco nur ekstere ŝajnas amikeca. La vera tristo estas la silenta aflikto sen ploro; la vera kolero estas severeco sen eksplodo; la vera korvarmeco estas la sincera amikeco sen monro de rideto. La natura dispozicio loĝas interne kaj la esprimo estas montrata ekstere. Jen kial la natura dispozicio havas la plej grandan gravecon.

“Kiam tiuj principoj estas aplikataj al la homaj interrilatoj, tiam la filoj estos sindonemaj kaj obeemaj al siaj gepatroj, kaj la ministroj estos fidelaj kaj lojalaj en servado al siaj reĝoj; la drinkantoj ĝuos verajn plezurojn en sia alkohola konsumado kaj la funebrantoj dronos en vera malĝojego. Por la ministro lojala, la esenca afero estas merita servado; por la drinkanto, sinplezurigo; por la funebranto, monro de malĝojego;

por la filo, kontentigo de la gepatroj. Ĉar la celo estas pli grava ol la rimedoj, tial por atingi la celon, diversaj rimedoj povas esti uzataj. Por la filo, kiu celas kontentigi la gepatrojn, la manieroj estas malmulte gravaj. Por la drinkanto, kiu serĉas plezuron en alkoholaĵoj, ne bezonas elekti la trinkvazojn. Por la funebranto pli gravas la esprimado de tristo, ol la ritoj funebraj. Sekvado de la ritoj estas la konduto de la vulgara homo; la pureco kaj la simpleco estas la natura dispozicio, kaj sekve estas neŝanĝeblaj. Jen kial la saĝulo sekvas la naturan instinkton kaj estas libera de la vulgaraj konvencioj. Kontraŭe, la malsaĝulo agas kontraŭ sia natura instinkto kaj estas ĉiam maltrankvila pri vulgaraj aferoj. Li ne scias ŝati sian naturan dispozicion kaj ĉiam sin konformigas al la ŝanĝiĝado de la vulgaraj konvencioj. Tial li neniel sentas sin kontentigita. Kia domaĝo estas, ke vi ekdronis tiel frue en la hipokriteco de la mondo kaj aŭdas pri la granda Taŭo nur tiel malfrue!”

Konfuceo denove riverencis la fiŝiston. Poste li rektiĝis kaj diris:

“Estas la ĉiela favoro, ke mi hodiaŭ renkontiĝas kun vi. Anstataŭ preni tiun ĉi renkontiĝon kun mi kiel humiliĝon, vi degnas trakti min kiel vian disĉiplon kaj persone instrui min. Ĉu mi povus permesi al mi demandi, kie vi loĝas, por ke mi povu preni al mi la liberecon iri al vi por plu ricevi viajn lecionojn kaj kompletigi la lernadon de la granda Taŭo.”

“Ne,” diri la fiŝisto, “ĉar mi aŭdis la onidiron: ‘Iru al la profunda Taŭo nur kun tiu, kiu estas kapabla vin sekvi; ne iru kun tiu, kiu estas nekapabla vin sekvi. Gardu vin, ke vi ne kuniĝu kun tiu, kaj vi estos libera de ĉia malbono.’ Bone zorgu pri vi mem. Mi devas foriri de vi. Adiaŭ!”

Ĉe tiuj ĉi vortoj la maljuna fiŝisto donis ekpuŝon al sia boato per la hokstango, kaj lia boato foriĝas de la bordo kaj malrapide malaperis laŭlonge de la rando de la fragmitejo.

Yan Hui returnis la kaleŝon. Zilu prezentis la grimpoŝnuron al Konfuceo, sed tiu ne turnis sian kapon. Li ankoraŭ koncentris sian atenton sur la fiŝiston kaj ne grimpis en la kaleŝon, antaŭ ol la ondetoj kvietiĝis kaj nenia sono de la remilo plu aŭdiĝis.

Sin apogante kontraŭ la flanko de la kaleŝo, Zilu

demandis:

“Majstro, jam longatempe mi vin sekvas, sed mi neniam antaŭe vidis vin tiel humila kaj respekto plena antaŭ aliaj. Vi ĉiam estas traktata kiel egalulo eĉ de princoj de regnoj de dek mil militĉaroj kaj dukoj de regnoj de mil militĉaroj, kaj eĉ tiam vi ne povas sukcese kaŝi vian arogantecon. Sed ĉi-foje vi profunde klinis vin, dum la fiŝisto rekte staris kun sia hokstango en la mano, kaj vi foj-refoje riverencis antaŭ ol respondi al li. Ĉu vi ne sentas vin iom tro humila? Ni disĉiploj pensas, ke ĉi-foje vi estis tre nekutima. Ni ne komprenas, kial tiu ĉi fiŝisto meritis tiajn favoron kaj respekton.”

Konfuceo sin apogis sur la antaŭa transversa stango de la kaleŝo kaj suspiris, dirante:

“Vi ja estas tro ŝtipkapa por esti instruata! Vi estas elmetata al la kulturado pri la ritoj kaj la justeco jam longan tempon, kaj tamen vi ankoraŭ ne estas senigita je via kruda kaj vulgara inklino. Alproksimiĝu, kaj mi diros al vi: Estas malĝentileco, se oni ne montras respekton al la pliaĝuloj, kaj estas nehumaneco, se oni ne honoras homon saĝan. Se tiu ĉi fiŝisto ne estus homo de perfekta virto, li ne povus fari, ke aliaj sentu sin humilaj antaŭ li. Se oni humiliĝas sen absoluta sincereco, oni certe pro tio perdos sian naturan dispozicion kaj sekve suferos konstantan fizikan damaĝon. Kiel bedaŭrinde!

“Nenia malfeliĉo estas pli ruiniga ol ne montri respekton al homo saĝa. Kaj tamen ĝuste tio estas via malfortaĵo. Cetere, la Taŭo estas la origino de ĉiuj estaĵoj: sen ĝi, ili pereos; kun ĝi, ili prosperos. La saĝulo devas montri respekton al la Taŭo ĉie, kie li ĝin renkontas. La maljuna fiŝisto certe jam atingis la profundan Taŭon. Kiel do mi kuraĝus ne montri mian respekton al li?”



Elĉinigis



Wang Chongfang

(Ĉinio)

Ĉineske

Yi Qiao (ĉino en Germanio)

Jaro de leporo*

— laŭ ĉinesko *flirta kanto***

1

Lepor', lepor'
novjara en aŭror'.
Brizo freŝa blove,
mondo verdas nove.
Veno, veno
printempa kun beno.

2

Fervor', fervor'
por jaro de lepor'.
Spektaklas festeno
kun kora bonveno.
Nove, nove
prosperas tuj pove.

* *Laŭ la luna kalendaro, ĉi-novjaro nomiĝas zodiaka leporo.*

Novjaro

— laŭ ĉinesko *flirta kanto***

1

Novjar', novjar'
prosperas sur kampar'.
Bonŝanco por homo
kun deca la nomo.
Mono, mono
multas laŭ bezono.

2

Novjar', novjar'
bonŝancas por homar'.
Aŭdiĝas belsono,
sufiĉas la mono.
Nomo, nomo
dia kun aromo.

***Flirta kanto (ĉine: Tiaoxiaoling): ĉina fiksfirma poemo el ses versoj de 4, 6; 6, 6; 4, 6 silaboj, laŭ*

rimaranĝo de aa,bb,cc. La 4-silabaj versoj konsistas el du ripetaj vortoj. Kaj la unua vorto de la kvina verso devas esti el palindrome aŭ metateze ordigitaj silaboj de la lasta vorto de la kvara verso. ekz. rimi-miri; mora-arom; nomo-mono; roso-soro.

Sankta fonto

— laŭ ĉinesko *Belulino Yu**
Rigardas ni ĉielon
kaj matenstelon.
Jen brilas jam la aŭroro
por beno de Dia la favoro.

Sur la nubtuŝa monto
’stas sankta fonto.
Laŭ Sinjora ver-ide
eternas vivo en Elizeo.

**Belulino Yu* (ĉine: Yumeiren) ĉina fiksfirma poemo el du strofoj kun po kvar versoj de 7,5; 7,9; / 7,5;7,9; silaboj kun para rimo.

Tajĝiĉŭano*

— laŭ ĉinesko *mallongigita melodio magnolia**

Por vivforto
efikas ĉina sporto.
La tajĝiĉŭano
utilas al homa sano.

Kontraŭ morbo
vitalas sana korpo.
Regula movo
profitas al vivopovo.



* *Tajĝiĉŭano* (ĉine: taijiquan) estas ĉina tradicia sporto, ankaŭ bonkonata kiel "Tai Chi".

***Mallogigita melodio magnolia* (ĉine: jianzi mulanhua) ĉina fiksfirma poemo el du strofoj kun po 4 versoj de 4,7; 4,7 silaboj kun para rimo.

Jadranka Miric (Serbio)

Kristnaska bondeziro

— laŭ ĉinesko *Sopir-al-sudo**

Griza tago.
Pendas nubaro
super ruĝaj tegmentoj.
Nek strata kolombo
kveras en paro.

Aŭdiĝas
Preĝejsonorilo
Sonoro eĥas forte.
Rompigas urba trankvilo
per via mobilo.

Kutime
dum Kristnasko ĉi
ĝuante bon-etoson,
en la familio ni
dankemas al Dio.

Preparis
bondeziron mi.
Jen, amo kaj kanto ĉi
al amikaro kaj por vi.
Ĝoja estu vi!

Pacon kaj
prosperan vivon,
sukcesan kunlaboron
regu inter ni !!!Sanon!
Solidarecon!

Fine ekneĝis

— laŭ ĉinesko *Sopir-al-sudo**

Rigardis
mi bildon ĉi.
La vintro brile pompas
en hejmloko de vi,
kara, mia ĉi.

Malnova

bildo de vintro.
Neĝtavolo abundis.
Infanoj kaj hundoj .Tro
por juna paro.!

Kandelo
lumon ĵetas sur
malhelan straton tra
vitro.Sur la granda mur'
luma avantur'.

Surstrate
blankiĝis nudaj arboj,
Sur branĉoj birdodomoj.
En ĝia varmo turtoj
kaj sekaj panjoj.

Subite
falas neĝeroj.
Jen, blankaj , travideblaj
flugantaj lanugeroj
en miaj haroj.

**Sopir-al-sudo (ĉine: Yijiangnan): ĉina fiksforma poemo el kvin versoj de 35,77,5 silaboj laŭ rimaranĝo xa,xa,a (x=senrima).*

Laimundas Abromas (Litovio)



Kulpas la najlo aŭ rakonto de Paĉjo

Mia panjo ne bezonis, ke paĉjo martelu ien tiun najlon.Ŝi tiel nur incitis, kolerigis paĉjon.

Kiam paĉjo post laboro revenadis hejmen, li kutime vespermanĝis kaj poste ŝaltadis televidilon por ekscii lastajn novaĵojn ,aŭ ŝaltadis komputilon por komuniki kun siaj gesamideanoj interrete.Tiam panjo tuj diradis:

—Do, la edzo de Maria tiiian belan bretaron muntis, tiom belan, ke oni ne povas satrigardi. Kaj jen — la najlon sur la muron li ne scipovas marteli...

Aŭ:

—La edzo de Aldona el malnova kesto produktis tian belan ŝranketon, do tiiian belan – kaj jen tiu – la najlon en la muron...

Paĉjo iomete nervoziĝis, sed ŝajnis, ke nenio okazas kaj plue okupiĝis pri la personaj aferoj.Kaj tio daŭris ĉiutage. Ni al kutimiĝis al tio, ĉar estis nenio terura : panjo diradis, paĉjo — ŝajnis kaj ni plu vivis feliĉe.

Tamen unutage, kiam panjo jam diris pri tiu najlo kaj paĉjo,kvankam nervoziĝinte, jam ŝajnis, ke nenion aŭdas, la televidilo ne plu eltenis kaj difektiĝis. Ĝi ekfulmis, poste io eksplodis kaj poste ĉesis funkcii. Tiuĉimomente eknervoziĝis jam panjo.

—Pro tiu mallertulo ĉivespere mi ne ekscios la sorton de Mariana. Kion li tuŝas, ĉio difektiĝas, -diris ŝi.

—Kaj almenaŭ la najlon en la muron..., sed ne...

Paĉjo frapis la televidilon je unu flanko, je alia flanko, poste la supron.

—Ĉikaze estas la komplika difektiĝo, -diris paĉjo.- Necesas inviti la ripariston-profesiulon. Ĉiokaze eĉ Dio mem nenion scipovos fari...

—Dio! Pro kio kulpas la Dio?! — komencis krii panjo. —La edzo de Oksana ne nur televidilon —eĉ la gladilon riparas. Kaj jen — la najlon en la muron...

Paĉjo tuta ektemis kaj malfermis la pordeton de la bufedo.Tamen tie estis malplene, tute malplene. Tiam li pli forte ekscitiĝis, turniĝis al panjo kaj tiel ekmuĝis, jam tiel ekkriis :

—Do vi... ,montru, kien tiun najlon marteli !

La panjo, kiel mi menciis, ne bezonis, ke paĉjo ien martelu tiun najlon, tamen nun ŝi ekinteresiĝis ege. Ŝi longe pensis kaj poste sur muro en kuirejo montris unu lokon apud la ŝranketo.

—Ĉi tie, — diris ŝi. —Ĉi tie mi tre bezonas la najlon.

—Tamen la muro ĉi tie estas betona, — ektemis paĉjo. —Ĉu ne pli bone estus ĉi tie? —li montris al la flanko de ŝranketo.

—Nu jen, mi diris..., — parolis panjo. —Kaj la edzo de Kazinjo en la feron najlas. Mi mem vidis, sur la flanko de fridujo jen tiiia najlo (panjo montris kiom longa) elstaras. Verdire, erere li tien najlis ĝin, (ne necesis nome sur la flankon de ŝranketo), tamen tutegale — en metalon!

Tiam paĉjo larĝigis la okulojn, pufvangis kaj kuris al tenejo.De tie li alportis du plenmanojn da najloj, la

